



**Esperanto
Societo
Frankfurto**

majo 2015

Esperanto-Gesellschaft Frankfurt am Main e.V.
gegründet 1904 – fondita 1904

ESPERANTO INFORMILO

Esperanto- Gesellschaft Frankfurt am Main	1. Vorsitzender: Martin Schmitt, Gießener Str. 18. 35415 Pohlheim Telefon: abends 0171-7412414 E-Mail: esperanto@scsy.de	Bankverbindung: Esperanto-Gesell- schaft Frankfurt /M. IBAN: DE75 5008 0000 0771 5717 01 BIC: DRESDEFFXXX Commerzbank Frankfurt/Main	Beitrag: mit DEB-Beitrag: 80 € Familienmitglied: 40 € Nur ESF: 20 € Familienmitglied: 10 €
---	--	---	--

Bufido



foto:ke

Pluvema tago – plumba grizo.
Ekpluvis; kaj aperis sur
la trotuaro eta bufo,
eble logita de la pluvo;
tiu bufido estas nur
eks-ovo granda kiel pizo,
sed la detaloj jam perfektis,
kaj sian vojon li elektis
celeme, rampis serioze,
kvazaŭ konscia pri natur',
kvazaŭ intence bufecoze –
bruna kameo el natur'!

*Marjorie Boulton
el „Cent ĝojkantoj“*

einladung zum klubabend

invito al la klubvespero

Bürgertreff Bockenheim
Schwälmer Str 28
Frankfurt am Main

donnerstag, d. 7.5.2015

ĵaŭdon, la 7an de majo 2015

Liebe Mitglieder, Freunde und Interessenten,
wir laden Sie zum nächsten Klubabend ein,
der am Donnerstag, den **7. 5. 2015** stattfinden wird.

Karaj membroj, geamikoj kaj
interesiĝantoj,
ni invitas vin al la venonta klubvespero, kiu
okazos ĵaŭdon, la **7an de majo 2015**.

18.30 h

SPRACHRUNDE

LINGVA RONDO

wörter von der küste

vortoj de la marbordo

Walter Ullmann

19.30 h

Laoso - manĝaĵo - homoj - vojoj - milito



Lavtago en Laoso

Gastoj el Danio

Jan kaj Lene Niemann venas de Danio kaj ŝatas vojaĝi. Sian trian vojaĝon al la tre bela kaj interesa lando, en la iama franca parto de Azio, ili prezentos kadre de kvar temoj: **manĝaĵo - homoj - vojoj - milito**. Multaj bildoj ilustras la rakonton pri ĝentilaj homoj, bela naturo, aliaj kutimoj kaj drama historio.

donnerstag, den 21.5.2015

ĵaŭdon, la 21an de majo 2015

18.30 h

Vorstandtssitzung (siehe Zusatzseite)

geburtstage im mai

naskiĝtagoj en majo

Hansgeorg Feißt, 08. 05.

Manfred Sailer, 27. 05.

Gerd Schubert, 29. 05.

ni gratulas!

Martin Schmitt prezentas sin



foto:uf

Karaj membroj,

mi kore dankas al vi por via fido kaj mia elekto kiel la nova prezidanto de la tradicioplena Esperanto-Societo Frankfurt. Mi aparte dankas al mia antaŭulino, Katarina Eckstädt, por ŝia laboro. Ŝi kaj s-ro Ullmann sendube ankaŭ en la nova estraro senlace antaŭenigos la klubon.

Vi eble jam scias, ke mi aĝas 43 jarojn kaj estas memstara komputilisto kun mia propra eta firmao en mia hejmo norde de Frankfurt. Mi havas familion kun edzino kaj du infanoj, kaj en mia libera tempo mi fotas, dankas, sufiĉe freneze komputilludas, kaj lernas Esperanton.

Nian mirindan informilon, kiu estas nia plej grava medio por teni kontakton kun niaj amikoj en la tuta mondo, ankaŭ estonte prizorgos Katarina. Kiel prezidanto mi volas fari la klubon pli videbla ekstere de Esperantujo, per publikaj atentigoj pri niaj renkontiĝoj kaj raportoj pri niaj internaciaj gastoj. Mia agendo jam estis sufiĉe plena kaj ĵus fariĝis eĉ pli plena. Mi multe antaŭĝojas pro multaj okazaĵoj kun vi en la venontaj jaroj.

Via

Martin Schmitt

Liebe Mitglieder,

vielen Dank für euer Vertrauen und die Wahl zum Vorsitzenden der Esperanto-Gesellschaft Frankfurt. Ich danke besonders meiner Vorgängerin, Katarina Eckstädt, für ihre Arbeit. Sie und Herr Ullmann werden sicher auch im neuen Vorstand unermüdlich für den Verein tätig sein.

Wie ihr vielleicht wisst, bin ich 43 Jahre alt und selbständiger IT-Kaufmann mit einer kleinen Firma in meinem Zuhause nördlich von Frankfurt. Ich habe Frau und zwei Kinder. In meiner Freizeit fotografiere und tanze ich, bin einigermaßen verrückt nach Computerspielen, und lerne weiter Esperanto. Unser wunderbares Informilo, mit dem wir Kontakt zu unseren Freunden in aller Welt halten, wird auch in Zukunft von Katarina betreut werden. Als Vorsitzender möchte ich den Verein vor Ort in Frankfurt sichtbarer machen, mit Veranstaltungshinweisen zu unseren Treffen und Berichten über unsere Besucher.

Mein Terminkalender war vorher schon gut gefüllt und ist jetzt noch voller geworden. Ich freue mich auf viele Treffen und Veranstaltungen mit euch in den kommenden Jahren.

Ihr
Martin Schmitt



Dio gardu min kontraŭ amikoj...

Mi preferas vivan
kontraŭulon klaran
pli ol malaktivan
samideanon elstaran,
senespere naivan.

El „Pluk“ de Poul Thorsen

ausflug und sommerfest

Die Mitgliederversammlung hat zwei Termine für dieses Jahr beschlossen:

Unser **Ausflug** wird uns am Samstag, den **13. Juni 2015** nach

DARMSTADT

führen.

Nach dem Mittagessen in Ristorante Delfino werden wir die

Mathildenhöhe

besuchen, wo die Künstler der Jugendstilzeit eine Künstlerkolonie hatten in der sie wohnten und arbeiteten. Ein Platanenhain, eine orthodoxe Kirche, ein Jugendstilmuseum und einige Wohnhäuser von den Künstlern werden bestimmt Ihre Aufmerksamkeit erregen.

Ein Spaziergang auf der

Rosenhöhe,

die zu dieser Zeit in volle Blüte steht, wird unseren Tag beschließen.

Sommerfest

wird am **4. Juli 2015** in dem Garten der Familie Rabenstein stattfinden.

Wir bitten Sie, diese Termine sich zu merken. In dem, „EI“ für Juni werden wir weitere Informationen: (Ort und Zeitpunkt) geben.

ekskurso kaj somera festo

La membrokunveno decidis pri du datoj por ĉi tiu jaro:

Ni **ekskursos**, la **13an de junio 2015** al

DARMSTADT

Post la tagmanĝo en la Ristorante Delfino ni vizitos

Mathildenhöhe,

kie la artistoj de secesio fondis la artistan kolonion, kie ili loĝis kaj laboris. Platana arboreto, ortodoksa preĝejo, muzeo kun artaĵoj el tiu tempo kaj kelkaj domoj de la artistoj certe atentigos nin.

Promeno sur


Rosenhöhe,

kiu tiutempe estas floranta, finos nian tagon.

Sommerfest

okazos la **4 an de julio** en la ĝardeno de la familio Rabenstein.

Ni petas ĉiujn rimarkigi ĉi tiujn datojn. En „EI“ por junio ni donos pliajn informojn: (renkontiĝloko kaj –tempo).



Johanna Hipp, 1897



Rosenhöhe - Löwentor

El nia (kaj mia) biblioteko - danaj Esperanto-aŭtoroj

Ni havos en majo danajn gastojn. Tio estis kaŭzo, ke mi foliumu en mia biblioteko. Mi trovis du aŭtorojn, kiujn mi tre ŝatas: Paul Neergaard kaj Poul Thorsen.

Paul Neergaard, dana agronomo, sciencisto, esperantologo - homo kiu posedis la talenton priskribi plantojn en preskaŭ poetika stilo. Li estis homo kiu amis ambaŭ: la plantojn kaj Esperanton. Bona ekzemplo estas la libro „La vivo de la plantoj“ el la jaro 1957 eldonita kiel n-ro 1 en Popularsciencia Eldonserio de J. Régulo de la eldonejo La Laguna.

La aŭtoro skribas en „Finvortoj“: „Tiun ĉi libron mi volis skribi al ĉiuj amantoj de la naturo, al ĉiuj, kiuj volas ion ekscii pri la leĝoj de la vivo. La temo estas prenita el la bela laborkampoj de la botanika scienco, sed mi kredas, ke mia rakontado, laŭ sia celo, apartenas pli al la komuna lingvo de Esperanto ol al ĝia scienca-teknika lingvo, kvankam iufone pure teknikaj vortoj devis esti uzataj.“


Apud la legado de ĉi tiu libro vi ĝuos ankaŭ la belegajn desegnaĵojn de Mads Stage. Vi povos miri kiom bela estas ulmofruktoj aŭ leontodo sendanta per vinda siajn semojn.

Alia, tradukisto kaj dana aŭtoro de poezio kaj pro **Poul Thorsen**, estis redaktoro, eldonisto, tradukisto. Li partoprenis Belartajn Konkursojn ĉe Universalaj Kongresoj kaj gajnis plurfoje premiojn. En la jaro 1954 li gajnis eĉ duan kaj trian premion por unu, la kvaran por la dua originala poemo kaj unuan premion por la tradukita poezio!

Li estis kunredaktoro de la Norda Prismo, altnivela revuo, redaktita de kvin redaktoroj el kvin landoj: Ferenc Szilágyi, ĉefredaktoro, Svedio, Baldur Ragnarsson, Islando, Johan Hammond Rosbach, Norvegio, Vilho Setälä, Finnlando kaj Poul Thorsen, Danio. Ni demandas nin nuntempe, kiel ili faris tion sen komputiloj. Ili montris: estis eble kaj estis bone.

Poul Thorsen estis profesia instruisto kaj li doktoriĝis en la jaro 1988. Lia temo estis „La evoluo de la dentologia faklingvo kaj ĝia evoluigo en Esperanto“.

ke



Wir werden in Mai Gäste aus Dänemark haben. Das war für mich Anlass, in meinen Büchern zu blättern. Ich habe zwei Autoren gefunden, die ich gern habe: Paul Neergaard und Poul Thorsen.

Paul Neergaard, dänischer Agronom, Wissenschaftler, Esperantologe – ein Mensch, der das Talent besaß, die Pflanzen in fast poetischem Stil zu beschreiben. Er war der Mensch, der beide liebte: die Pflanzen und Esperanto. Gutes Beispiel dafür ist das Buch „Das Leben der Pflanzen“ aus dem Jahr 1957, verlegt als Nr. 1 in Popularsciencia Eldonserio de J. Régulo des Verlages La Laguna.

Der Autor schreibt im „Nachwort“: „Ich wollte dieses Buch für alle Naturliebhaber schreiben, für alle, die etwas über die Gesetze des Lebens erfahren wollen. Das Thema ist aus dem schönen Arbeitsfeld der botanischen Wissenschaft entnommen, aber ich glaube, dass ich mein Ziel, mehr gewöhnliches Esperanto als wissenschaftliche Sprache zu benutzen, erreicht habe, obwohl ich manchmal auch rein technische Worte benutzen musste.“


Neben dem Lesen werden Sie auch die herrlichen Zeichnungen von Mads Stage genießen. Sie werden sich wundern, wie schön die Frucht einer Ulme oder der Löwenzahn sind, die ihre Samen mit dem Wind verteilen.

Der zweite, **Poul Thorsen**, war Redakteur, Verleger, Übersetzer und Autor von Gedichten und Prosa. Er hat an Belartaj Konkursoj teilgenommen und mehrere Male Preise bekommen. 1954 hat er sogar den 2. und 3. Preis für eines und den 4. Preis für ein anderes originales Gedicht bekommen, dazu den 1. Preis für übersetzte Poesie!

Er war einer von fünf Redakteuren der hochwertigen Zeitschrift „Norda Prismo“. Die Redakteure waren aus fünf Ländern: Ferenc Szilágyi, Chefredakteur, Schweden, Baldur Ragnarsson, Island, Johan Hammond Rosbach, Norwegen, Vilho Setälä, Finnland und Poul Thorsen, Dänemark. Wir fragen uns heute, wie das ohne Computer möglich war. Sie haben gezeigt: es war möglich und es war gut.

Poul Thorsen war Lehrer und hat 1988 über das Thema „Entwicklung der Fachsprache der Zahnheilkunde und ihre Entwicklung in Esperanto“ dissertiert.

ke



Paul Neergaard (1907 - 1987)

Printempa vekigo. La forto de la kreskado

(Komenco de la dua ĉapitro el „La vivo de la plantoj“)

La fruktarboj kaj la arbedoj en la ĝardeno estas en plena florado. Siringo, orpluvo, magnolio, rododendro – per larĝa peniko estas pentrataj la koloroj en tiu ĉi sezono. La forta ekkresko en la frusomero ŝanĝas la bildon de tago al tago. Dum la lastaj semajnoj la heĝo elpuŝis longajn ŝosojn ĉiufanken. En la fragbedo la plantoj abunde disvolvis freŝajn foliojn, la florojn nun estiĝas verdaj fruktoj, kaj la maldikaj stolonoj rapidas



en ĉiuj direktoj, ĉiu portas en la pinto malgrandan, preskaŭ pretan fragplanton.

La grandaj verdaj terpomplantoj nun ekfermas la vicojn. Ne pasis longa tempo, de kiam la violkoloraj ĝermoj ekaperis el la tero; poste la planto fariĝis verda, novaj folioj senĉese alvenis, la plantoj estiĝis plenkreskaj kaj fortikaj, kaj nun burĝonas la floroj, kaj la unuaj glataj, blankaj, sukstreĉaj tuberoj baldaŭ povos esti portataj en la domon.

Kaj kie antaŭe la kampo estis nuda, tie la greno nun staras balacinĝanta sur siaj altaj ŝalmoj, kiuj elŝosiĝis en la daŭro de nemultaj semajnoj.

Grandega torento, kiamaniere ĝi ekmoviĝis? Tiu silenta eksplodo – la ĉiujara, dinamika artofajraĵo de la planta mondo.

Antaŭ nelonge la fortoj ripozis en la semoj kaj travinrantaj burĝonoj kaj radikoj. Tiam la printempo vekigiĝis, unue hezite, poste fortiĝante kiel kreŝĉendo. Iom post iom la suno dum tiuj ĉi monatoj ekmovis neimageblajn kemiajn kaj fizikajn fortojn.

Ni povas mezuri tiun ĉi energion. Ni povas determini la potencon de la sukplena planta histo laŭ metra sistemo. Ĝi estas komparebla al muskolforato kaj pezo de homo.

Se sep plengrandaj viroj stariĝus unu super alia en la neverŝajna akrobataĵo, la piedoj de la malsupra el la fortikaj viroj tiel forte premus kontraŭ la planko de la maneĝo, ke tio proksimume respondus al tio, kion la fizikisto nomas „premo de unu atmosfero“.

Sed gracia tritika planto estas siamaniere pli forta ol la fortulo sur la planko de la maneĝo. Ĝiaj tigoj kaj folioj devas esti sukostreĉitaj, kaj energio estas necesa por suĉi nutraĵon el la tera akvo supren en la kreskantajn ŝosojn. Premo de dek atmosferoj – la premo de sepdek viroj sur unu paro da piedoj – jen kiel grandega estas la mova forto, la osmoza premo, en sukostreĉita tritika planto en ordinaraĵo cirkonstancoj. Kaj ĝi povas fariĝi ankoraŭ pli forta. Kiam la tero en la kampo eksekiĝas, la salaj solvaĵoj en la ĉelsuko plikoncentriĝas, la suĉpovo de la planto pligrandiĝas, la omoza premo de la suko ege plifortiĝas kaj povas sepoble pligrandiĝi, la dek atmosferoj fariĝas sepdek. Kompare al tio aŭtomobila radringo plenpumpita havas vere nur modestan premon: ĝi sumiĝas je du atmosferoj.

Floroj, kiuj nombras la helajn horojn



tritiko

Kiel kalendaro la floroj rakontas, kiom da tempo pasis el la jaro. Dum la vintro la heleboro kaj la neĝborulo floras spite al neĝo kaj malvarmo; venas tiam la printempo kun krokuso kaj narciso, grapolhiacinto kaj dafodilo kaj peonio en rapida sinsekvo, kaj kun la florkaskadoj de la fruktarboj; poste la somero kun kavalirsporno kaj kaskofloro, papavo kaj cejano, sekvaltaj en la malfrua somero de georgino, sunfloro kaj vergo d'oro, kaj fine venas do la aŭtuno kun la krokusosimilaj nudaj virgulinaj.

(Komenco de la kvara ĉapitro)

Poul Thorsen (1915 - 2006)



**Julio Baghy (md) im
Gespräch mit
Poul Thorsen,
Budapest, 1953**

Matena distriĝemo

Laŭ trotuaro drivas ŝi revante,
dum ludas sur la lipoj eta rido.
Sub ŝiaj brovoj estas la libido,
kaj la elastaj membroj ritmas lante.


Matena distriĝemo vibras rante
de ŝia tranca kaj tenera vido.
Taŭzetas vento buklojn kun subito
kaj premas molajn mamojn sarabande.

Sed la rigardo ŝvebas preter ĉiu
dum ŝia frua, reva promenado,
ĉar nur la korpo strebas for de tiu,

ĉe kiu ĵus flamegis la beato.
Ekstazas plu, videble al neniu,
la orfaj pensoj brake de l' amato.

*Verko premiita en la Belartaj Konkursoj
Dua premio de poezio, 1954*

Proverbe



Por egalecon praktiki
gravas diferencigi.



De ateisto varmiga vorto:
Mi kredas al vivo antaŭ la morto.



Al diplomatoj trejniĝas laringoj
plej malmulte diri en plej multaj lingvoj.



Se malrapide vi rapidas,
la malglataĵoj pli rapide glitas.



Por industrie bone vivi
necesas ĝismorte produktivi.



Ju pli da voja ĝeno.
despli da ĝoja reveno.



Televideo por senkritikuloj
similas al maĉgumo por la okuloj.




Ne eblas tranĉi tra mano
Per banano.



Necesas nutri la fantazion
por plene profiti la racion.

El „Du el“ de Poul Thorsen

*Ĉiuj desegnaĵoj de la parto
„El nia (kaj mia) biblioteko“
estas el la libro
„La vivo de la plantoj“
de Mads Stage*



Einladung zur Vorstandssitzung

An alle Mitglieder des Vorstandes

Liebe Vorstandsmitglieder und interessierte Mitglieder,

ich lade euch herzlich zur Vorstandssitzung am Donnerstag, dem 21.05.2015
um 18:30 Uhr ein.

Tagesordnung:

1. Begrüßung und Feststellung der Beschlussfähigkeit
2. Abstimmung der Arbeitsweise des neuen Vorstands im Jahr 2015
3. Programmpunkte / Sprachrunde
4. Ausflug und Sommerfest
5. Bücherkäufe für die Bibliothek
6. Verschiedenes

Martin Schmitt,

Erster Vorsitzender